
LA LAMPIRO

59-a jaro   n-ro 151   2018:3



Zamenhof

Vida, obra e ideias do autor do Esperanto



Autor: Alexander Korjenkov
Editora: Temática - Rondônia, 2018
Formato: 18 cm, 196 páginas

Tradução para o português da obra "The Life of Zamenhof", a qual é uma versão condensada do original em esperanto "Homarano", do pesquisador russo Alexander Korjenkov.

easp.org.br/butiko

KOVRILO

Mura fonbildo
(pixabay.com)

LA LAMPIRO *59-a jaro n-ro 151 2018:3*

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo
Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)
Grafikaranĝo: José Roberto Tenorio
Revizianto: vakas
La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj

easp

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo
Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra sidejo
Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.org.br

Jarkotizo por 2016

Simpla Membro	R$ 120,00
Subtena Membro	R$ 240,00
Ŝtatinterna Membro	R$ 60,00

Deĵoroj:
merkrede: 10h – 16h; ĵaŭde kaj vendrede: 13h – 17h; sabate: 9h – 13h.

ENHAVO

Vortoj de la redaktanto

Jen ni proponas unu plian numeron de La Lampiro, klopodante obei laŭeblan dumonatan akuratecon. Pro tio ni devas denove danki niajn verkemajn kunlaborantojn. Ne necesas ripeti, ke ankaŭ vi, kara leganto, estas konstante invitata sendi viajn tekstojn por nia publikigo.

En ĉi tiu numero ni substrekas la prezenton de la tria parto de serio pri Lisbono, fare de Cristina Graaf, nia estrino pri Turismo. Espereble tio spronos EASP-anojn al Portugalujo por la baldaŭa Universala Kongreso.

Aliflanke, ni publikigas simpatian reagon de eminenta, internacie konata leganto: Hori Jasuo, la homo de la Esperanto-Sumoo.

Dume, ni plu atendas ĉies komentojn, proponojn kaj kritikojn.

Vortoj de la Prezidanto

Prof. Genildo Martins Coelho



Kara EASP-anoj, mi venas al vi por informi, ke nia laboro brave plu sekvas. Plej grava lastatempa novaĵo inter ni estas la Departemento de Edukado, kiun gvidas nia juna, vigla samideano Wilian Gomes. Li havas novajn ideojn kaj freŝan entuziasmon sur tiu kampo. Kiel vi povas legi en ĉi tiu numero de nia revuo, ni anoncas la bezonon, kiu volontulo okupu la postenon de helpanto de Wilian en tiu fako. Vi povas imagi, kiom da laboro akumuliĝas! Ni do bezonas pliajn fortojn!

Ankaŭ en la Departemento de Turismo, kiun estras Cristina Graaf, ekaperas novaj iniciatoj. Ankaŭ ŝi bezonas helpanton.

Gravan kontribuon ni krome aldonu. Danke al la teknika kapablo de nia asociano Carlos Rodrigues (kiu laboras por nia butiko, cetere), nuntempe malfermiĝas la ebleco, ke niaj kulturkunsidoj, je ĉiu lasta sabato, en ĉiu monato, estos elsenditaj realtempe per fejsbuko. Jam en la monato aprilo multaj samideanoj, el foraj urboj, informis, ke ili sekvis la prelegon kaj diskutojn, posttagmeze. Nun Carlos klopodas per taŭga materialo plibonigi la kvaliton de la elsendoj.

Flava febro

Joel de Ó (Lorena-SP)

Flava Febro estas virusa malsano kaŭzata de la flavfebra viruso. En la plejparto el la kazoj la simptomoj konsistas el febro, frostotremo, perdo de apetito, naŭzo, kapdoloro kaj muskoldoloro, ĉefe sur la lumboj.

La simptomoj ĝenerale mildiĝas en la daŭro de la kvar unuaj tagoj. En kelkaj homoj unu aŭ du tagojn post la mildiĝo de la simptomoj, reaperas febro, abdomena doloro kaj misfunkcio de la vundita hepato, kio okazigas ikteron (flavan aspekton de la haŭto). Kiam tio okazas, pligrandiĝas la risko de rena nesufiĉeco.

La flavfebra viruso estas transigata per piko de infektita ina moskito. La flavfebra viruso infektas nur homojn, aliajn primatojn kaj diversajn moskitspeciojn. En la urboj la viruso estas transigata ĉefe de la moskito *Aedes aegypti*, kiu estas ARN-viruso el la genro *Flavivirus*.

Ne ĉiam estas facile distingi inter Flava Febro kaj aliaj malsanoj, ĉefe dum la unuaj fazoj. Por konfirmi iun eblan kazon, estas necese realigi sangekzamenojn.

Nuntempe ekzistas sekura kaj efika vakcino kontraŭ la Flava Febro. Kelkaj landoj postulas, ke vojaĝantoj estu vakcinitaj antaŭ ol transiri ĝiajn limojn.

Inter la agadoj kiuj evitigas la dissemadon de la malsano estas la malpligrandigo de la moskita populacio, kiu transigas la viruson.



La traktado de la homoj infektitaj de la viruso, celas mildigi la simptomojn estigitajn de la malsano. Ne ekzistas medikamentoj rekte agantaj sur la viruson. La tria fazo de la malsano, la plej grava, kondukas al morto de proksimume duono de la pacientoj, kiuj ne ricevas terapion.

Ĉiujare Flava Febro kaŭzas la morton de miloj da homoj. La plejparto el la mortoj okazas en Afriko, proksimume 90 procentoj el la mondaj kazoj. Flava febro okazas precipe en tropikaj kaj subtropikaj regionoj de Sudameriko kaj Afriko, sed Azio ankoraŭ ne registris kazojn de la malsano. Jam okazis epidemioj en Usono kaj Eŭropo. La malsano originis el Afriko, el kie dissemiĝis tra Sudameriko pere de la sklavtrafiko en la XVII-a jarcento. Inter la XVIII-a kaj XIX-a jarcentoj la Flava Febro estis unu el la plej danĝeraj infektaj malsanoj. En 1927 la flavfebra viruso estis la unua homa viruso laboratorie izolita.

Kino: Sankta Sangado

Anna Lobo (São Paulo-SP)

Nomo: Santa Sangre
Reĝisoro: Aejandro Jodorovisky
Ajtoroj: Blanka Guerra, Axel Jodorovisky kaj Guy Stockwell
Nacio: Italio/Meksiko, 1990.
Kategorio: Dramo/Teruro



Por bone kompreni la filmon, oni devas havi dekomence iun ideon pri ĝia direktoro. Alejandro Jodorovisky estas konsiderata nun kiel majstro de la kina superrealismo. Tio ne estas la nura ŝatokupo de tiu ĉilia kinisto — Li ankaŭ aktoras, ŝatas tarokon, verkas, kaj estas la fondinto de psikomagio. Ofte li estas rigardata kiel frenezulo, sonĝisto, megalomaniulo pro sia kreemo. Sed, ne ofte estis tiel. Liaj filmoj plurfoje estis malŝatataj kaj malbone taksataj, kaj kiam li vidis ke kineja medio volis enkadrigi lin kaj limigi lian kreemon, li komencis arigi monon por siaj filmoj ekster tiu medio.

Pri lia filmo nun komentata, mi unue povas diri ke ĝi multe impresis min. En la filmo mi sentis min mirigita kaj samtempe skuita. Ĝi estas filmo por plenkreskuloj — ne necesas averti ke oni ĉiam kontrolu pri la aĝlimo, ĉu ne? Ĝi ja estas unu el tiaj filmoj, por kiuj vi devas esti preparita mense. La filmo rakontas pri familio kiu vivis en cirka medio. Pro ĵaluzo kaj perfido la familio rompiĝas. Kaj ankaŭ alia forta trajto tie estas ke ĝi ŝvebas sur simbola etoso, religia kaj superstiĉa. La filo, kiu simbole nomiĝas Fenix, fine iras al mensmalsanulejo. Mirinda parto de la filmo komenciĝas post kiam lia panjo elsavas lin el tiu loko.

La etoso de la filmo estas kolora, bunta, reviga. Samtempe ĝi havas ian troigon kaj malmildecon pro la disvolviĝo de la historio, kiu vere ŝokas la spektanton. Ankaŭ, mi malkovris ke Axel Jodorovisky — la filo de Alejandro aktoras kiel la plenkreska Fenix, kaj ĝi estas vere impona aktorado, li sukcesas bone transdoni la sentojn de sia rolo. La prilaborado de la psikologia parto de la roloj estas ege bone pripensita.

Kion pli diri? Nur, ke vi spektu ĝin! La tuta filmo estas en youtube, bedaŭrinde nur hispane kaj kun subtitolo en la hispana. Sed, bona ebleco por trejni tiun lingvon, kaj spekti interesan filmon, ĉu ne? Ĝis la sekva filmo, kaj bonan spektadon.

Filozofio por nia ĉiutaga vivo

La mensogo kaj ni

José Mauro Progiante (Bauru-SP)

Mi ne volas konkuri kun Anna Lobo, certe ne superebla, tamen ĉi-foje mi enkondukos la temon rekomendante filmon. “La Inventado de la Mensogo” (originala nomo (anglalingve): *The Invention of Lying*; portugallingva versio: *O Primeiro Mentiroso*), de 2009, estas iom naiva, tamen ĝi ebligas pripensi la rolon de la mensogo en niaj interrilatoj. La protagonisto vivas en stranga socio, en kiu ĉiuj diras ĉiam la veron, sed en iu momento li ekscias, ke eblas mensogi kaj, plie, ke la kapablo mensogi alportas avantaĝon super la aliaj.

Komuna saĝo diras, ke absoluta vero, en ĉiuj cirkonstancoj, detruus la socian kunvivadon, kaj ke, en ioma grado, ĉiuj mensogas. Tamen la grado de toleremo antaŭ la mensogo varias laŭ tempoj kaj kulturoj, kaj ankaŭ la filozofoj prezentas diversajn vidpunktojn pri tiu afero.

Laŭ Aŭgusteno (354-430) kaj Kantio (1724-1804), la mensogo estas ĉiam malaprobinda.

Antaŭ ol ili, tamen, Platono (428/427-348/347 aK) diris, ke en kelkaj situacioj la mensogo estas necesa, kvazaŭ amara kuracilo.

La franca filozofo Rousseau (1712-1778) ne aprobis la mensogon, sed li opiniis, ke nevera aserto estas mensogo nur se ĝi kaŭzas damaĝon al iu.

La fakto estas, ke aro da devoj kaj rajtoj influas niajn decidojn, kiam ili povas efiki sur aliaj personoj. Se diri la veron estas nediskuteble obeinda devo, ĉu estas akcepteble defendi la ekziston de rajto je mensogo?

Laŭ Schopenhauer (1788-1860), jes, se la mensogo estas necesa por defendi la propran vivon, liberecon aŭ honoron. Li eĉ diris, ke foje mensogi iĝas devo. Tio okazas, ekemple, kiam pli bonfaras al iu kaŝi la veron ol malkovri ĝin (pia mensogo).

Alia citinda filozofo, kiu kontraŭstaris Kantion, estas la sviso Benjamin Constant (1767-1830). Ankaŭ li opiniis, ke diri la veron estas homa devo, sed li rimarkis, ke tiu devo ekzistas nur antaŭ tiuj, kiuj rajtas scii la veron.

La supraj ideoj rilatas al unu flanko de la temo, en kiu nia pozicio estas aktiva, kiel eblaj semantoj de mensogoj. Plurfoje en ĉiu tago ni devas decidi ĉu mensogi aŭ ne, konsiderante la konsekvencojn de niaj agoj kaj vortoj.

Ekzistas tamen alia flanko de la temo, en kiu nia pozicio estas pasiva, ĉar en ĝi ni ricevas la efikon de agoj kaj vortoj de aliuloj. Do ni estas ankaŭ eblaj rikoltantoj de mensogoj. Tio ofte okazas, ekzemple, en nia rilato kun politikistoj.

Prie estas interese koni la pensojn de Nietzsche (1844-1900), ĉar li avertis, ke la distingo inter vero kaj mensogo ne ĉiam estas klara. Laŭ li, mensogo ŝajnas

(Daŭrigota en la paĝo 10).

Iom da Esperanto-historio
Virina klubo

Eurípedes Barbosa (Brasília - DF)

En Rio-de-Ĵaneiro ekzistis Esperanto-klubo nur por virinoj. En la 2a de aŭgusto 1912, Julia Fernandes fondis Virinan Klubon, kiu fariĝis tre konata en tiu urbo, pro siaj propagandaj festkunvenoj, en kiuj partoprenis membroj de Brazila Esperanto-Ligo kaj de aliaj esperantistaj organizaĵoj.

Jen la unua estraro de Virina Klubo: honora prezidanto — doktoro Lazaro Luiz Zamenhof; prezidantino — sinjorino Irene Amélia Santos; vicprezidantino — sinjorino Maria Chalréo; unua sekretariino — fraŭlino Julia Fernandes; dua sekretariino — fraŭlino Candida Ribeiro; kasistino — sinjorino Dioguina Chalréo Corrêa.



Julia Fernandes (?-1927)

En la revuo Brazila Esperantisto, n-ro de septembro/oktobro 1912, oni trovas la sekvantan noton: "Aliĝis al BLE la ĵus fondita Virina Klubo, kies sidejo estas sur strato General Severiano, 170. Tiu klubo jam havas 105 aninojn."

La 10-an de novembro 1912, okazis bela propaganda promenado de la aninoj de Virina Klubo al Leme, kvartalo en Rio-de-Ĵaneiro.

En la 4a de majo 1913, okazis kunveno de tiu klubo, ĉe la hejmo de la klubanino Hortencia Berrini. Al tiu kunveno ĉeestis kelkaj lernantoj de la instruistino Júlia Fernandes. Oni paroladis, kantis kaj deklamis.

La aninoj de Virino Klubo vere tre ŝatis festojn. La 6an de julio 1913, ekzemple, ili renkontiĝis ĉe la hejmo de Corina Soler, kie oni ludis fortepianon, kantis, deklamis, dancis. En la muzikprezentado partoprenis jenaj personoj: Carmen Faria Rocha, Avani S. do Couto, Adelaide Moraes, Vanda S. do Couto, Julia Fernandes, Chiquinha Amaral, Hilda Amaral, Joaquina Amaral, Dioguina S. Corrêa, Arlindo Esteves kaj Hygino Esteves.

Denove ili festis. En la 5-a de oktobro 1913, la aninoj de la klubo estis en la hejmo de sinjorino Orisaba Duarte Guimarães. Partoprenis en la festo multaj geknaboj. La programo konsistis

el muzikaĵoj, deklamadoj, kantoj, kiuj tre plaĉis al ĉiuj, kiuj havis la feliĉon tie ĉeesti. Du eksterlandaj esperantistoj tie aperis por saluti la klubaninojn.

Kadre de la 5a Brazila Kongreso de Esperanto, la 14-an de decembro 1913, je la deka matene, "cent sesdek geesperantistoj, inter kiuj multe da sinjorinoj, fraŭlinoj kaj infanoj, forveturis per specialaj tramoj ĝis Praia da Saudade. Muzikistaro de Corpo de Bombeiros (Fajrobrigado) iris kune kaj aŭdiĝis belaj marŝoj dum la promenado. En Botafogo, aliĝis al vojaĝantaro la estraraninoj de Virina Klubo, kiuj kunportis la ĉarman standardon de tiu klubo (Brazila Esperantisto, novembro/decembro 1913)."

Pli ol 150 personoj ĉeestis la kunvenon de Virina Klubo, la 5an de julio 2014. Tiu belega evento, kiu estis organizita de ĝia prezidantino, konsistis el ludado de fortepiano, mandolino kaj violono, kanto, deklamado kaj balo. Dum tiu renkontiĝo, estis disdonata al ĉiuj geĉeestantoj bongusta kaj granda esperanta kuko.

Virina Klubo celebris la duan datrevenon de sia fondiĝo, en la 2-a de aŭgusto 1914. Fraŭlino Julia Fernandes, je la nomo de tiu klubo, donacis monsumon al "Asylo de N. S. de Pompeia" kaj al "Brazila Ligo Esperantista." Dankante la donacon, doktoro Couto Fernandes, prezidanto de BLE, salutis Virinan Klubon . Gazetoj kaj revuoj publikigis fotojn pri la evento.

La 11-a de aprilo 1915, okazis renkontiĝo de aninoj de Virina Klubo ĉe restoracio, en Leme. Post la kunveno, ili promenis tra la belega marbordo.

Virina Klubo okazigis serion de lernigaj prelegoj, invitante por fari tion eminentajn esperantistojn, jene: la 3-an de majo 1916, Couto Fernandes parolis pri "La uzado de prepozicioj; la 1-an de julio 1916, Venâncio da Silva instruis pri "La vortfarado en Esperanto; en la 2-a de septembro 1916, Carlos Veloso prelegis pri "Participoj en Esperanto"; en la 3-a de marto 1917, Everardo Backheuser instruis pri la "Uzado de akuzativo"; la 2-an de junio 1917, Antônio Arêa Mourinho prelegis, sed Brazila Esperantisto (junio/aŭgusto 1917) ne informas pri la temo; la 1-an de septembro 1917, Annibal de Souza instruis pri "deveno de la prefiksoj"; en la 3-a de novembro 1917, generalo Manoel Portilo Bentes paroladis pri temo ne menciita de Brazila Esperantisto.

Dum la aktivado de Virina Klubo, en la daŭro de pli ol 20 jaroj, prezidis ĝin la sekvantaj virinoj: Irene Amélia Santos, Rachel Bessa Filho, Adelina Lopes Vieira, Romana Forster Vidal, Maria César, Maria Luiza Bocaiuva.

La unua statuto de Virina Klubo havis nur 6 artikolojn. En la unua artikolo, oni trovas la celon de la klubo: praktiki koversacion en Esperanto kaj pligrandi la disvastigadon de la lingvo. Ankoraŭ laŭ la statuto, la balotado por elekti la estraranojn okazis ĉiujare, kaj la kunsidoj de la estraro okazis en la unua dimanĉo ĉiumonate, ĉe hejmoj de aninoj.

(Daŭrigota sekvapaĝe).

En 1927, la klubaninoj aprobis novan statuton.

Kiam tiu klubo ĉesigis sian aktivadon? Mi ne kapablas precizigi la koncernan daton, sed mi supozas, ke tio okazis inter 1935 kaj 1937. En la n-ro de marto/decembro 1934, Brazila Esperantisto publikigis liston de asocioj aliĝintaj al BEL, inter ili Virina Klubo. La revuo ne aperis de 1935 ĝis 1937. Ĝi estis denove eldonita en la jaro 1938, sed ne plu aperis Virina Klubo kiel asocio aliĝinta al BEL. Tiu klubo perdis forton post la morto de Júlia Fernandes, kiu estis ĝia animo.

Dum sia ekzistado, Virina Klubo realigis multe da festaj kunvenoj, kiuj konsistis el literatura parto, muzika parto kaj danco, regalante la ĉeestantojn per teo, kafo kaj dolĉaĵoj. Plurfoje, la aninoj de tiu klubo donacis monsumon al Brazila Ligo Esperantista kaj al "Azilo de nia Sinjorino de Pompeia" kaj al "Azilo Sankta Isabel."

Kiel jam dirite, Julia Fernandes fondis Virinan Klubon en 1912, kies motoro ŝi estis ĝismorte (en 1927).

Julia Fernandes esperantistiĝis en la jaro 1907, kiam ŝi faris bazan kurson en la sidejo de "Colomy Club", Rio-de-Ĵaneiro. Tiu kurso estis gvidita de Alberto Couto Fernandes, kiu prezidis Brazilan Esperanto-Ligon dum 36 jaroj.

Ŝi estis kasistino de Brazila Klubo Esperanto kaj delegito de UEA en Rio-de-Ĵaneiro.

Ŝi okupis la postenon de unua sekretariino de Virina Klubo ĝis la jaro 1924, kiam ŝi estis aklamita honora prezidantino de tiu societo. Ŝi estis rigardata de samtempuloj kiel fervora kaj sindonema esperantistino – vera motoro de Virina Klubo.

Julia Fernandes instruis nian lingvon en la lernejo "Carmen Silva", en la publikaj lernejoj "Barth" kaj "Orsina da Fonseca", kaj en "Associação Espírita de Botafogo".

Ŝi mortis en Rio-de-Ĵaneiro en 1927, kaj ŝian enteriĝon ĉeestis anoj de Brazila Ligo Esperantista, de Brazila Klubo de Esperanto kaj de Virina Klubo.

La katolikaj esperantistoj organizis meson por la ripozo de ŝia animo.

Brazila Esperantisto, eldono de septembro/decembro 1927, publikigis ŝian negrologon, dezirante ke ŝi ripozu pace.

Daŭrigo de la pago 7 *(La mensogo kaj ni)*

vero kiam ĝia adresito ne posedas pruvojn aŭ logikajn pensojn por refuti la diraĵon. Li diris ankaŭ, ke multfoje la homo ŝatas esti trompita, ke li fuĝas ne de la mensogo, sed de ĝiaj konsekvencoj, se tiuj ĉi estas malbonaj.

Se ni ne estas tiaspecaj homoj, se ni ne volas esti trompitaj kaj engluti mensogojn, la sola vojo estas kleriĝi kaj akrigi nian juĝkapablon, per konstanta akirado de scioj kaj ĝustaj informoj pri ĉio.

Bunta Esperanto-Kongreso

Inter 31/05 kaj 3/06 2018, en bonega etoso kaj ĉeesto de 240 homoj, okazis la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto, en la urbo Kuritibo, ŝtato Paraná, Brazilo. Oni povas diri, ke ĝi estis preskaŭ perfekta evento: densa, riĉenhava kaj bone organizita programo, dum kiu prezentiĝis serio da bonnivelaj prelegoj kaj diskutoj pri plej variaj temoj. Belegaj ceremonioj malfermis kaj fermis la kongreson, dum kiuj oni montris plurajn buntajn muzikajn kaj dancajn spektaklojn, fare de la lokaj artistoj. (Tiusence, oni elstarigu la intensan ĉeestadon de neesperantista publiko en parto de la kongresejo, kiu estis publike alirebla!). La dumkongresaj artaj vesperoj estis eksterordinare altnivelaj: unu el ili, prezento de rafinita "Festa Rekviemo por Priplorinda Mondo" (aŭtoro Jorge Telles, originale en Esperanto); la alia, prezento de esper-antigitaj muzikaĵoj fare de moderna ĵazeca ensemblo kaj kanto de la konata Flávio Fonseca. En unu posttagmeza momento, estis spektebla la teatraĵo "Tiradentes", monologo de la veterana Esperantisto Amarílio Carvalho, en la publika parto de la kongresejo. En la lasta arta vespero, estis anoncitaj la rezultoj de Literatura Konkurso de BEJO.

Oni proponis al kongresanoj partoprenon en la KER-ekzamenoj, kiun prizorgas edukado.net, kaj aliĝis fakte 24 kandidatoj.

Dum la tuta kongreso funkciis bona libroservo. La kongresejo situis en la Universitato UNINTER, kiu simpatias al Esperanto kaj senpage cedis komfortajn ĉambrojn provizitajn per komputilaj projekciiloj kaj bona interreta konekto.

Kurioza programero estis la 1-a Kurado Esperanto por Paco kaj Diverseco, kiun oni bonege organizis en bela natura parko. Ĉeestis ankaŭ multaj neesperantistoj kaj oni abunde informis pri nia lingvo al tiu sportema, energioplena publiko.




Libro-recenzo

Hodler en Mostar

Paŭlo S. Viana (Lorena-SP)

"Hodler en Mostar" (Eldonejo Edistudio, 2006) estas kurioza, ĉarma romano – kiel oni devus nepre esperi de talenta aŭtoro kia estas la kroata Spomenka Stimec. Kio plej impresas en la rakonto esta mem ĝia konstrukoncepto.

Kiam oni komencas la legadon, oni tuj eksupozas, ke ĝi temas pri la vivo de la prestiĝa svisa pentristo Ferdinand Hodler (1853-1918). Post kelkaj paĝoj aperas la figuro de lia filo, la adoleskanta Hector Hodler (1887-1920), kaj la leganto tuj ekkonjektas, ke ĉi tiu grava persono en la historio de Esperanto okupos la ĉefan rolon. Sed ankaŭ tio ne okazas. Fakte, Augustine, la granda amo de la artisto, minacas akapari la panoramon de la rakonto, sed ankaŭ ŝi tuj poste malaperas. Restas sur la tuta historiolinio la modelino Jeanne, kiu aperis jam en la unuaj paĝoj de la libro: ŝi montriĝas la reala protagonisto. Post kunvivado kun la pentristo, ŝi dum la tuta rakonto estas sekvata de la leganto, eĉ post du aliaj edziniĝoj. La romano fine montras sian intencon. Per rapidaj, delikataj scenoj, ĝi montras la iradon de bela sentema virino, en la komenco de la 20-a jarcento, en mondo tiam trapasanta multajn drastajn ŝanĝojn. Ŝi eliras el la rafinita centra Eŭropo, transiras al Usono kaj poste al Bosnio-Hercegovino. Por akompani la edzojn, ŝi devas travivi sentojn jen de fiero, jen de kolero, jen de senprotekteco, jen de strangeco.



Postvivas en ŝi tiu virino origine pariza, kun propra rigardo al la mondo.

Per la legado de ĉi tiu verko oni alvenas al la konscio, ke ne la homo kondukas la vivon, sed flosas en ĝi kvazaŭ eta senpilota barko en vasta maro. Homa tasko estas teni la spiriton ekvilibra kaj, se eble, konservi sencon en la vivoirado.

Spomenka Stimec (1949), senkonteste grava aŭtoro en la Esperanta Kulturo, produktis unu plian sukan verkon. Ŝi estas ankaŭ tradukisto, instruisto kaj aktive laboris por la Esperantlingva Verkista Asocio (EVA). Ŝia plej konata verko estas la bonega "Ombro Sur Interna Pejzaĝo" (1984), sed ŝia tuta literatura verkaro estas impona. Ŝia stilo estas moderna, vigla, flua kaj natura.

"Hodler en Mostar" estas vere leginda libro.

Lisbono - gasturbo de la UK 2018
(Tria kaj lasta parto)

Cristina Graaf (Ilhabela/SP)



Tertremo en 1755

La Centjaro de lumoj (1755 ĝis la nuna tago)

Ofte oni legas en la historio de monumentoj kaj preĝejoj de Lisbono ke ili estis rekonstruitaj aŭ rekuperitaj post la tertremo de 1755. Ĉi tio estis la plej nigra momento en la historio de Lisbono.

La 1-an de novembro 1755, Lisbono suferis grandan tertremon. La teroj tremis kaj la loĝantaro kuris al la liberaj spacoj apud la Rivero Tejo, nur por droni en la grandega tsunamo kiu venis el la Atlanta Oceano. Sekvis rabado kaj la grandaj fajroj.

Pro la tertremo, Lisbono estis ruinigita. De la 20,000 domoj de la pli malaltaj klasoj, 17,000 estis detruitaj kaj 35,000 homoj estis mortigitaj. Ankaŭ detruita estis la Granda Reĝa Turo, la domo de la Hindio, la Monaĥejo de Karmo, la Kortumo de la Inkvizicio, la Hospitalo de Ĉiuj Sanktuloj.

La katastrofo donis al la Markizo de Pombal la ŝancon praktiki la novajn politikojn kaj ekonomiajn teoriojn de la Klerularo. La rekonstruado de Lisbono iĝis prioritato. La tertremoj apenaŭ ĉesis, kaj la Markizo de Pombal jam organizis ideojn por rekonstrui la urbon. Li komencis dirante: "Enterigu la mortintojn kaj nutru la vivantojn" kaj ekis labori. Pro ĝia determino kaj praktikeco, Lisbono leviĝis rapide kaj pli bone ol iam.

Lisbono ankaŭ trapasis periodon de liberalaj militoj, sinonimo de nestabileco. En la 19-a jarcento, la komercaj rilatoj de Lisbono esence vivis per tio, kion produktis la kolonioj. Ĉe la kultura kaj eĉ komerca nivelo estas periodo de ŝanĝoj. La centro de la urbo ŝanĝiĝis al Chiado. Ĉi tiu estis la periodo de la grandaj verkistoj, kiel ekzemple Almeida Garret, Alexandre Herculano aŭ Guerra Junqueiro, kaj kiam aperas la fado kaj la muzikteatro.

En ĉi tiu sama jarcento la lando industriiĝis. Lisbono iĝis industria centro, kun granda starigo de tolaĵoj, tabako, spicaĵoj kaj kaŭĉuko. En periodo de multaj neegalecoj, la popolo ribeliĝis en Lisbono, kaj en 1910 la Unua Respubliko estis establita. Meze de tiom da politika kverelo, kun la ĉefurbo ĉiam kiel la scenejo de ĉi tiuj movadoj, la

(Daŭrigota sur la paĝo 20)

Muro-pentraĵo
Ekde Prahistorio ĝis Antikva Epoko

Antonia Sobral (Silvianópolis - MG)

De la komenco de la homekzistado sur la Tero, en ĉiuj epokoj kaj lokoj, la homaro postlasis signojn pri sia estado kaj travivado. Unu el la plej ofta maniero fari tion estis, kaj ankoraŭ estas, la ago desegni aŭ pentri sur surfacoj, ĉu eksteraj, ĉu internaj, de ŝirmejoj, domoj aŭ publikaj lokoj.

Arkeologiaj esploroj malkovris murpentraĵojn ekde la Malfrua Paleolitika Periodo (40 - 30 000 a.K. ĝis 10 - 8 000 a.K.), kiuj temis pri la ĉirkaŭa naturo, ĉefe bestoj. La prauloj ne pentris pro amo al arto, sed pro postvivado- (ĉasado), povo- kaj magio-kialoj. Ili faris siajn proprajn farbojn per tero kun karbo, bestsango kaj bestaj grasoj. Kiel pentrilojn, ili uzis la fingrojn kaj aliajn kudraĵojn, ekz. stumpo de ligno. Unu el la karakterizaj trajtoj de la bildoj estis la skizado.



Surmura pentraĵo en kaverno de Lascaux - Francujo (17 - 15 500 a.K.)

Tamen ĵusaj malkovroj asertas, ke estis trovitaj la plej antikvaj surrokaj artaĵoj el la mondo faritaj de neandertaluloj, antaŭ 65 000 jaroj, sur la muroj de tri kavernoj en hispanaj regionoj. Tiuj malkovroj montras, ke male ol tio, kion oni kredis, tiuj prauloj ne estis tiel sovaĝaj kaj stultaj; ili jam uzis pigmentojn por pentri la murojn kaj eĉ iliaj artaĵoj eble jam havis abstraktajn ideojn. Ŝajne la neandertaluloj kaj la homo sapiens sapiens estis similaj rilate la konakiro-kapablon.

Laŭ la pasado de la epokoj kaj la ŝanĝoj de vivmaniero, la surmuraj pentraĵoj ankaŭ ŝanĝiĝis. Ili fariĝis pli geometriaj, raciaj, pli simplaj kaj abstraktaj dum la Neolitika periodo, kelkaj simboligis movon (ekz. dancojn), komunuman kaj ĉiutagan vivon kaj signojn, ĉar la homo ne plu estis nomadoj — ili fiksis sin en kamparo, kie ili ekbredis kaj kulturis kampojn. Laboro per metalo kaj principoj de arkitekturo okazis en tiu periodo.

De tiuj signoj estiĝis la skribo, kiam komenciĝis la nomata Historio. Ekde tiam la arta evoluo estis pli rapida kaj intensa, do estas neebla afero rakonti pri ĉiuj etapoj kaj ĉiuj lokoj. Citindaj estas la pentraĵoj en:



Lageto en ĝardeno.
Fragmento de la Tombo de Nebamun

• Antikva Egiptujo (3 000 a.K.) - la pentraĵoj estis ĉefe faritaj sur arkitekturaj elementoj, kiel tomboj de faraonoj kaj muroj de riĉulaj domoj.

• Grekujo - Insulo Kreto (2 300 a.K.) - minoa civilizo - surmuraj ornamaj pentraĵoj plena je harmonio kaj movo, brilaj koloroj, sur surfacoj de palacaj arkitekturoj.

• Romio (750 a.K.) - la pentraĵoj, ĉefe faritaj per freska tekniko, estis sur la internaj muroj aŭ plafonoj de la domoj. La temoj variis laŭ la tempopasado: abstraktaĵoj, ornamaĵoj kun floraj, arabeskaj kaj homaj temoj, mitologio, iluzidono de arkitekturaj elementoj, kiel kolonoj, fenestroj kun pejzaĝoj kaj pligrandigo de areoj per perspektivo.

• Romia Imperio (27 a.K. -) - La paleokristana arto estis la unua kristana arta esprimo dum la jarcentoj III kaj V p.K. La freskoj estis pentritaj sur muroj de katakomboj kaj sarkofagoj kaj temis pri preĝoj, kristanaj simboloj kaj bibliaj tekstoj.

Dume, en la orienta parto de la mondo:

• Ĉinujo: la ĉina arto reprezentas la plej signifajn akirojn de la monda civilizacio. Ĝia fundamenta principo estas harmonio kaj ekvilibro, kaj esprimas subtilan miksaĵon de tradicio kaj novaĵo, de religiaj kaj profanaj bildoj. Multaj estis la murpentaĵoj trovitaj en la urbo Dunhuang, kiuj temis pri sanktaj rakontoj.

• Japanujo: la longa kaj riĉa historio de japana pentrarto montras sintezon kaj diversecon de stiloj. En la sesa jarcento,



Ceremonio de Deméter, fresko ĉe Vilaĝo de Misteroj, Pompejo

pentraĵoj kun budhismaj bildoj estis la plej popularaj. Pentristoj estis dungitaj por pentri la murojn de temploj, kiuj estis konstruitaj en grandaj nombroj, kiel ekzemple tiuj en la Templo Horyu-ji no Ikaruga, Nara. Ili prezentas epizodojn pri la vivo de Budho kaj aliaj diaĵoj.

Arto kaj homaro aliiĝas samtempe, tiel, ĉiuperiode, novaj teknikoj estis disvolvitaj kaj novaj temoj kaj trajtoj aperis. Oni povas rimarki, ke ĉi tiuj muraj artaĵoj estas parto de la historio de ĉiu civilizacio, ili povas informi al ni la vivmanieron, la pensmanieron, la organizon de la socio, inter multaj aliaj faktoj rilataj al la studado de la homaro. Ilia konservado estas esenca por tiaj studoj.



Murpentraĵo de la tombo Takamatsuzuka

Daŭrigo de la pago 14 *(Lisbono - gasturbo de la UK 2018)*

Unua Respubliko falis kaj diktatoreco alprenis povon. Ĝla plej granda figuro estis Antonio de Oliveira Salazar.

La ĉefurbo trapasis periodon de granda demografia kresko, pro ekonomia kaj industria disvolviĝo. En la ĉirkaŭaĵoj aperis, "stanaj kvartaloj" por gastigi la amason da homoj, kiuj volis vivi en Lisbono.

Tamen, la reĝimo de Salazar kaj Marcelo Caetano estis renversita de la "Revolucio de Diantoj", en plena Lisbono, en 1974.

Portugalio aliĝis al Eŭropa Unio en 1986 kaj Lisbono gajnis urbajn planojn por aranĝi la grandegan loĝantaron .

Hodiaŭ Lisbono estas pura, historia urbo kun perfekta, unika lumo!

El la vivo de fajrobrigadisto

Alencar Esmeraldo (Mogi das Cruzes - SP)

Mi laboris en kazerno por fajrobrigado dum dudek kvin jaroj, kaj en la daŭro de tia longa tempo mi ĉeestis plurajn akcidentojn. Mi memoras plurajn akcidentojn, sed inter ili mi rememoras kelkajn, kiuj pli forte impresis.

Tiu ĉi okazis en dimanĉa somera vespero.

Mia laborloko situis proksime al la maro, ĉirkaŭ sesdek kilometrojn for, sur vojo de homoj, kiuj serĉas marbanojn. Proksimume je la 15-a horo alarmo eksonis kaj informis nian teamon, ke okazis akcidento sur la ŝoseo inter la urboj Mogi kaj Bertioga, kun homo premita inter feraĵoj. Mi kaj mia teamo iris al la loko.



Kiam mi venis tien, mi vidis kondukiston en venturilo, sed li ne estas premita inter feraĵoj, li estis vundita kaj apogita al la stirilo. Li jam estis mortinta, kaj ni ne povis helpi. Mi vidis knabon sidantan sur la tero, proksime al la venturilo, kun la kapo inter la kruroj, en silento. Nenian vorton li diris. Mi demandis li trifoje, sed li respondis nur kiam mi demandis la kvaran fojon. Lia respondo estis peto.

Li petis de mi:

"Bonvolu, savu mian patron!"

En tiu ĉi momento mi restis senaga, tra mia kapo pluraj pensoj trapasis, kaj mi demandis min:

"Kion mi faru?"

Kaj la respondo ne venis. Mi silentis.

Mia koro estis afliktita, ĉar en tiu ĉi momento mi ne havis vortojn, mi ne sukcesis ion ajn diri al li. La sola vorto, kiun mi diris:

"Ni savos vian patron!"

Sed mi sciis, ke ni ne povus helpi lian patron. Mi ne diris veron al li, mi sciis, ke lia patro jam estis mortinta.

Mi alvokis alian profesiulon por la plenumado de la tasko, kaj ni revenis al la kazerno.

Dum tiu tago mi malfeliĉis. Mi vidis lian malĝojan vizaĝon, lian ploradon silentan apud la patro.

En nia laboro ni ne ŝatas doni tiajn informojn, sed bedaŭrinde ni devas tion fari, de tempo al tempo.

Fotono
Partikloj de lumo

Guilherme Jardim (Charqueada-SP)

Ĝis la jaro 1905, ĉiuj kredis kompreni kio estas la lumo. Ĝi konsistas el ondoj en elektromagneta kampo kiu enestas en la universo. Antaŭe, tiu "kampo" estis imagita kiel ia subtanco, nome "etero", tamen tio jam montriĝis erara antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj. Tamen, ion tre strangan oni rimarkis pri tiuj "ondoj". En la epoko en kiu la elektronoj estis malkovritaj, en la fino de la jardeko 1890-a, oni rimarkis ke, se oni lumigas metalan materialon per ultraviola lumo, elektronoj estas eligitaj el la materialo. Tio oni nomis "fotoelektra efekto." Kiel eblus malgranda oscilo en unu nevidebla kampo okazigi tion? Tiu estis la demando al kiu Einstein dediĉis sian menson, produktante la monografion kiu donis al li la nobelpremion.

La kaŭzo de la fotoelektra efekto, diris Einstein, baziĝas sur la kvantuma teorio de Planck. Ĉiam kiam varmigita materialo eligas kvantumon da energio en la formo de lumo, tiu luma energio fariĝas nedividebla porcio – unu partiklo nomata "fotono". Ju pli alta la pozicio de la lumo en la spektro, des pli da energio la fotono kunportas. La videbla lumo, de la ruĝa koloro al la viola koloro, ne posedas sufiĉan energion por produkti la efekton. En la ultraviola lumo, tamen, unu fotono kunportas sufiĉan energion por ke, atinginte unu elektronon, ĝi kapablas eltiri ĝin el ĝia origina atomo. La energio de unu fotono estas priskribita de la notinde simpla ekvacio E=hv, kie E estas la energio, h estas la Konstanto de Planck kaj v, frekvenco aŭ koloro de la lumo. Por la mondo ĝenerale tiu ne estas la plej fama ekvacio de Einstejn, tamen li konsideradis ĝin la plej bona ero de sia scienca laboro kaj ĝiaj konsekvencoj por la fiziko estis iomete malpli grandaj ol tiuj de la teorio de Relativeco sekvinta.

La ekzisto de la fotonoj ne estis elpruvita per izolita observado, sed per kompleta serio da eksperimentoj faritaj de la usonano Robert Millikan kaj ankaŭ de la anglo Arthur Compton, per sendependa maniero. Ili elmontris detale la hipotezon de Einstein. Ekde tiam, la sciencistoj devas kunvivi kun la kompreno ke la lumo kondutas jen kiel ondo jen kiel partiklo, laŭ vi planas vian eksperimenton. Eĉ pli strange, ne nur la lumo havas duoblan personecon. En la jardeko 1920-a, juna franco nomata Victor de Broglie elmontris ke iu ajn tipo de partiklo, ĉu unu elektrono, ĉu unu protono, aŭ eĉ unu tuta atomo, ankaŭ kondutas kiel ondo. Tiu estas la tipo de malkovro kiu igas la nesciencistojn konfuzaj. Estas facile imagi unu partiklon – sufiĉas imagi unu

(Daŭrigota en la paĝo 22)

Biblioteko Lorenz en Ĉeĥio

El Ĉeĥio ni ricevis la ĉi-suban korezspondaĵon, kiu certe interesas nin, brazilanojn. La leteron al ni transdonis la sekretario de Portalo Bona Volo, Maria Aparecida da Silva, al ki uni kore dankas.

Karaj amikoj,

La 8an de julio okazis grava evento en la komunumo Vrdy (Ĉeĥio), al kiu nun administracie apartenas Zbyslav, la naskiĝvilaĝo de František Vladimír Lorenc (ĉeĥa formo de F. V. Lorenz).

La loka biblioteko portas ekde la 1a julio oficialan nomon "Knihovna Františka Vladimíra Lorence Vrdy" (Biblioteko Francisko Valdomiro Lorenz Vrdy) kaj dimanĉe la 8an de julio okazis senvualigo de la memortabulo pri F. V. Lorenz sur ĝia ekstera muro, produktita fare de la skulptisto kaj esperantisto Zdeněk Myslivec. Le publiko konsistis el proksimume 100 personoj. El Brazilo salutis la ĉeestantojn la ĉeĥa ĝenerala konsulo el Sao Paŭlo, s-ino Pavla Havrlíková.

Post la enkondukaj vortoj de la urbestro Antonín Šindelář, la biblitekistino Pavla Kobelová prezentis honorajn gastojn kaj skizis la programon de la posttagmezo. Sekvis prelego de Petro Chrdle pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenz kun legitaj fragmentoj el la libro pri Zamenhof (estis cititaj Lorenz mem, el sia letero al fratino, lia amiko, kaj s-ino Novinski, eksa estro el la Muzeo de enmigrintoj en Dom Feliciano), Pavla Dvořáková prezentis sian mur-ekspozicion pri F. V. Lornez, kiu restos en la koridoro de la biblioteko. Post salutvortoj de sinjorino Havrlíková, prezidantinoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj Asocio de handikapitaj esperantistoj, oni menciis skribajn salutojn (inter ili ankaŭ la viajn, sed ankaŭ de la pranepo de F. V. Lorenz, la ĉeĥa honora konsulo en Porto Alegre). Ĉiuj ĉi, kun la tradukoj, estis en tablo por rigardi kaj restos konsulteblaj en la biblioteko.

Sekvis la propra senvualigo de la memortabulo fare de la konsulino el Sao Paŭlo kaj urbestro de Vrdy, la tosto kaj refreŝiĝo, dume en prelegĉambro estis ripete projekciita ĉeĥe dublita 14-minuta brazila filmo pri Lorenz, kaj oni povis ankaŭ konatiĝi kun la libroj de la eldonejo KAVA-PECH. Plej granda intereso estis kompreneble pri la libro de Vlastimil Novobilský, ne nur pri la ĉeĥa versio, sed vendiĝis eĉ kelkaj en Esperanto. Bedaŭrinde ĝia aŭtoro ne povis ĉeesti pro serioza malsano.

Post la priskribita riĉa programo oni busveturigis la partoprenantojn al la

(Daŭrigota en la paĝo 22)

Minirakontoj

Ĉu nova literatura ĝeno?

Paŭlo Sergio Viana (Lorena-SP)

Unu el la plej karakterizaj inklinoj de la homo estas... rakontado. Ĝi estas parto de la homa historio. Oni preskaŭ rajtas diri, ke homoj ne vivas sen rakontado, ĉu pri veraj, ĉu pri fikciaj aferoj. Ŝajne, la perparola transdonado de spertoj al aliaj kunhomoj havas ian mensan funkcion. Ĉu ĝi helpas la ekvilibron de la mensa sano de la rakontanto? Ĉu ĝi helpas la rakontantoj, eĉ kiam temas pri fantaziaj rakontoj? Ĉu ankaŭ aŭskultantoj ricevas helpon por elteni la krudecon de la vivo sur nia mondo? Fakto estas, ke dum jarmiloj la homoj rakontis siajn kaj aliulajn spertojn, en obseda ofteco: homoj ne vivas sen rakontado.

Rakontado fariĝis arto. Oni povas diri, ke tiu arto komenciĝis antaŭ la ekzisto de homaj lingvoj. Kompreneble, ĝi komenciĝis per voĉaj paroloj, ĉirkaŭ la fajro, en praaj kavernoj, fine de pena tago. Dume, prahomoj gravuris kaj pentris sur rokoj, antaŭ dekmiloj da jaroj, scenojn priskribantajn iliajn ĉasojn kaj medion. Oni povas konsideri, ke tiuj estis la unuaj registritaj rakontoj en la historio, ĉar tiuj pentraĵoj sendube estis ia speco de lingvaĵo.

Multaj artaj rakontoj fariĝis universale konataj. La Epopeo de Gilgameŝ, la homeraj Iliado kaj Odiseado, la arabaj Mil kaj Unu Noktoj estas tipaj ekzemploj. Ili penetris la nekonsciajn tavolojn de la homa menso kaj bone ilustras la potencon de rakonta arto. En Oriento, rakontoj estis rimedoj por la iluminiĝo de disĉiploj – la famaj "koan". Simile al la Jesuaj paraboloj en la Nova Testamento. Kaj ĝis nun psikologoj kaj pedagogoj rekomendas, ke oni rakontu tradiciajn fabelojn al infanoj, ĉar tio helpas ilian mensostrukturiĝon.

Multaj verkistoj famiĝis pro siaj rakontoj. Ĉi tie mi nun aludas ne al longaj noveloj kaj romanoj, sed al pli densaj rakontoj, kiuj per nemultaj paĝoj atingas fortajn rezultojn, jen dramajn, jen komikajn, jen surrealismajn. Listo estus longa. Ni menciu nur kelkajn: Cervantes, Grim, Andersen, Ezopo, Hemingway, Ĉekov, Maupassant, Karen Blixen, Machado de Assis.

Oni ne pensu, ke rakonto estas nur nelonga romano aŭ novelo. Ne temas nur pri kvanto da paĝoj. Rakontoj normale havas unu historiolinion, ofte kun unusola protagonisto. Romanoj kaj noveloj estas pli kompleksaj, kun pluraj historiocentroj, pluraj gravaj rolantoj, kaj disvolviĝas per interplektado de pluraj situacioj. Cetere, ekzistas rakontoj kun longeco de unu paĝo, kaj rakontoj kun longeco de dekoj da paĝoj, tiel ke limo inter rakonto kaj novelo foje estas neklara. Ekzemploj de longaj rakontoj

estas tiuj de João Guimarães Rosa ("La Horo kaj Vico de Aŭgusto Matraga"). Ankaŭ "La Alienisto", de Machado de Assis, estas longa rakonto.

Dum la lastaj dudek jaroj, okazis en la tuta mondo movado por tute mallongaj rakontoj. Ili povas esti duonpaĝaj aŭ nur kelkliniaj. La eminenta Carlos Drummond de Andrade, ekzemple, publikigis sukan volumon kun tiaj mallongaj "70 historietoj" (1978). Ankaŭ la kuritibano Dalton Trevisan.

Sed la afero evoluis. Lastatempe, oni emas krei vere severan formaton por tiel nomataj minirakontoj. Eble tio rezultas de la moderna uzado de interreto, en kiu ĉio devas esti fulme rapida. Per "Twitter", ekzemple, oni eĉ faras konkursojn pri rakontoj verkitaj per ne pli ol 140 komputilaj klakoj. En ĉi tiu okazo, eĉ interpunkciaĵoj kaj spacetoj inter vortoj estas enkalkulataj. Eblas ankaŭ limigi la rakontojn al dudek, dek aŭ eĉ nur al ses vortoj. La defioj estas plurnivelaj. Kaj nekredeble, kreemaj verkistoj sukcesas rakonti tutajn historiojn per mirinde malmultaj vortoj.

Minirakonto fakte ne estas tute nova afero. Ĝi nur atingis la staton de literaturo minimumisma. Se oni atentas, la fama letero de Julio Cezaro, 47 jarojn antaŭ Kristo, rakontanta sian batalon al Romanoj, estas perfekta minirakonto:

"Veni. Vidi. Vici." ("Mi venis. Vidis. Venkis.")

En moderna tempo, multaj aŭtoroj sin dediĉas al minirakontoj kaj oni emas nomi ĝin "nova literatura ĝenro". Ni lasu klara la koncepton pri minirakonto. Ne sufiĉas banala frazo por nomi ĝin tia. Ekzemple: "Petro iris al la panvendejo kaj aĉetis du panojn." Tute ne! Minirakonto estas klopodo trovi subtilajn manierojn sugesti tutan historion, kiu tamen ne estas plene montrita. Kvazaŭ oni montrus pinton de glacimonto sur la maro, pri kiu oni devas imagi la subakvan parton. Oni lasas al la imagemo de la leganto la muntadon de la kompleta historio. Eble oni povas kompreni tion pli bone per ekzemploj.

La hondurasa-gvatemala verkisto Augusto Moterosso verkis mini-rakonton, kiu fariĝis fama kiel unu el la plej trafaj:

"Kiam li vekiĝis, la dinosaŭro ankoraŭ ĉeestis."

Minirakontoj povas esti surrealismaj, kiel la ĵus montrita. Jen aliaj:

"Mi aŭdis bruon ĉe la pordeto, mi rigardis, tio estis la Novluno." (Nei Duciós)

"Li prenis la ĉapelon, enpakis la sunon, kaj neniam plu mateniĝis." (M. Braff)

"La homo estis nevidebla, sed neniu perceptis tion." (J.M.Merino)

"Kaĝo ekiris serĉe de birdo." (Kafka)

Minirakontoj povas esti tre realismaj, dramecaj:

"Oni vendas: bebajn ŝuetojn neniam uzitajn." (Hemingway)

"Homo en Monte Carlo iras al hazardludejo, gajnas unu milionon, revenas hejmen kaj sin mortigas." (Ĉekov)

"Tuta vivo antaŭ li. La pafo alvenis de malantaŭe." (Cíntia Moscovich)

Minirakontoj povas esti profunde poeziecaj:

"Mi elektis pasion. Nun mi estas malriĉa." (K. Whitlock)

"Mi ankoraŭ preparas kafon por du personoj." (Z. Nelson)

"Mi demandis. Ili respondis. Mi skribis." (S. Junger)

Verki bonan minirakonton estas defio al fantazio, al trafa vortouzado. Ĝi devas kaŭzi surprizon, skui la leganton, stimuli la menson de la leganto. La leganto estas alvokata kompletigi la historion, kiel kunaŭtoro.

Ĉu vi emas provi?

(Ĉi tiu teksto estas resumo de prelego farita en la 53-a Brazila Kongreso de Esperanto, en Kuritibo, ŝtato Paraná.)

Daŭrigo de la pago 18
(Eŭreka: Fotono)

etan tenisan pilkon. Kaj estas facile imagi unu ondon. Sed kiel eblas io esti samtempe unu ondo kaj unu partiklo? La solan respondon kiun la fizikistoj havas estas: ne provu imagi tiajn aferojn – nur vidu la rezultojn de la eksperimentoj kaj komparu kun la ekvacioj de la teoriistoj kaj vidu vi mem ke devas esti vero.

A. Einstein, Annalen der Physik, 17, 132 (1905)

Daŭrigo de la pago 19
(Biblioteko Lorenz)

proksima naskiĝvilaĝo de Lorenz, Zbyslav, kie oni vizitis la lokan preĝejon, en kiu estis Lorenz baptita, la iaman lernejon, kie li komencis edukiĝi kaj deekstere ankaŭ lian naskiĝdomon. La domo ankoraŭ staras, estas en privata posedaĵo, bedaŭrinde ne plu loĝata kaj en preskaŭ katastrofa stato.

Petr Chrdle, KAVA-PECH

Lingvaj Respondoj

de Francisco Wechsler



Verboj post "KE"

Demando: kiel ĝuste traduki la jenajn verbotempojn de la Portugala lingvo?
Eu queria que você gostasse de ler.
Quando chegar, eu queria uma festa.
Desejo que você seja feliz.
Espero que ele compreenda minha mensagem.
Minha expectativa é que você tenha sucesso.
Gostaria que ele fosse meu amigo.

Respondo: ne ekzistas unusola ebla traduko por ĉiu unuopa frazo, tamen oni devas respekti kelkajn principojn. La u-modon oni uzas, kiam oni deziras esprimi ordonon, volon, deziron, opinion aŭ celon. Tial, se la ĉefa propozicio enhavas, ekzemple, unu el la jenaj verboj: *ordoni, komandi, voli, deziri, aspiri, peti, celi,* oni devas uzi la u-modon por la verbo de la sekva propozicio. Kontraste, post la verboj *atendi*, *antaŭvidi* kaj *prognozi* oni uzas la os-modon, dum post la verbo *esperi* oni ordinare uzas la os-modon, sed iafoje ankaŭ la u-modon.

Tial, eblaj tradukoj por la menciitaj frazoj estas, respektive:
Mi deziras, ke vi amu legi.
Mi deziras, ke oni festu mian alvenon.
Mi deziras, ke vi estu feliĉa.
Mi esperas, ke li komprenos (aŭ: komprenu) mian mesaĝon.
Mi atendas (aŭ: prognozas), ke vi sukcesos.
Mi deziras, ke li estu mia amiko.

Ankaŭ eblas mildigi esprimon de volo aŭ deziro uzante la us-modon post ke: *Mi dezirus, ke vi amu legi. Mi dezirus, ke oni festu mian alvenon. Mi dezirus, ke vi estu feliĉa. Mi dezirus, ke li estu mia amiko.* Ĉi tian formon oni trovas plurloke en la verkaro Zamenhofa.

Se la frazo efektive esprimas imagon, tiam pli taŭgas uzi la us-modon en ambaŭ propozicioj. Ekzemple, por la sesa frazo eblas apliki la jenan elturniĝon: *Plaĉus al mi, se li estus mia amiko.*

Mi profitas la okazon por averto, nome, ke nuntempe multaj tradukus la unuan frazon per: *Mi deziras, ke vi ŝatu legi*; kaj la sesan per: *Mi ŝatus, ke li estu mia amiko*; aŭ per: *Mi ŝatus, se li estus mia amiko.* Tamen tia uzado de la verbo *ŝati* ne akordas kun ĉi ties origina signifo, kiel difinita en la *Fundamento* kaj en la *Lingvaj Respondoj.*

Paca muziko

Alfrado Aragón (Rio de Janeiro - RJ)

La nuntempa situacio en la mondo (ne nur Brazila) pensigas nin pri paco, kaj tuj venas al mia menso: “Ĉu ekzistas paca muziko?” Ĉu muzikkomponistoj faris muzikon pensante pri paco? Eble ne, sed ili pensis pri preĝo, aŭ faris muzikpreĝojn eĉ ne pensante pri preĝo? Eble ankaŭ jes. Ni iru momente al la pasinteco, aŭ simple al pasado; mia pigreco ne permesas al mi iri tro longe, do ni iru nur ĝis la deksesa jarcento. Tie mi trovis kelkajn komponistojn, kaj ili diris, ke la muziko tiutempe estis dividita je religia kaj profana; tio estas pri multaj aferoj de la vivo inter ili pri amo, kaj eĉ pri amoro, mi serĉis inter ili, iun de mi admiratan: Tomas Luís de Victoria, vere tre simila al la portreto kiun mi vidis en libroj, li sin montris tre afabla kaj klarigis al mi pri verkoj liaj, religiaj, kiun ni povas konsideri preĝoj. De la unua libro (li faris plurajn, entenantajn mesojn kaj motetojn), li menciis la tre konatajn de mi “O magnum misterium”, kaj “O vos omnes” por 4-voĉa koruso.

Ankaŭ por koruso (tiutempe nur por koruso oni komponis, sed kelkaj komponistoj fortigis la korusojn per trombonoj). Pluraj mesoj, kaj ne nur por la 4-voĉa sed eĉ por 8-voĉaj, ĉiuj en stilo polifonia, tute kontrapunkta, li kiel pastro parolis al mi nur pri religiaj komponaĵoj kaj pri lia profesoro Giovanni Pierlugi da Palestrina kaj lia lernado en Italio por la pastriĝo kaj muziko. De la tria libro li nur menciis sian rekviemom, nome meson por mortintoj.

Sed mi vidis la anglon Thomas Morley, kaj tuj mi iris al li, ĉar mi memoris, ke en la tempo kiam mi regis la koruson de l’ “Centro Colomboamerikano” en tri literoj BGT (Bogoto), ni kantis verkon lian kaj eĉ en mia traduko el la angla al Esperanto (April is in my mistress face – Kiel printempo). Post la gaja saluto, mi komentis pri tiu traduko kaj li diris ke ĝi ne plaĉis al li dekomence, sed li interesiĝis pri tiu lingvo, kaj diris ke iomete li lernis ĝin, pro tio nia dialogo estis komprenata de ambaŭ. Kaj komentis, ke li lernis muzikon kun William Byrd, tre konata nuntempe de gitaristoj, ĉar li verkis por liuto, hodiaŭ gitaro. Ankaŭ li parolis pri la enhavo de pluraj verkoj de sia tempo, kaj ĉiuj preĝis pere de muzikoj kun tekstoj religiaj, kvankam ili, – laŭ li –, ne multe komprenis religion kaj sekvis iom blinde la kristanismon pro tio ke ne estis alia.

Jes, estas multaj muzikaj preĝoj kaj ni nun vidas ke la ĉielo klariĝas. Ĉio pasas, eĉ tiu terura situacio pasas kaj la klarigoj venas kun la novaj tempoj.

Pli da paco oni vidas en la horizonto kaj ni devas esti certaj, ke la preĝo de Bach en la Suito numero 3 (konata kiel “Air”) estas sekvata de la preĝo de Villa-Lobos en la bachiana numero 4 kaj, mi diras, eĉ pli konscia ol tiu de Bach.

ILEI partoprenas en la 53-a BKE

Aristophio Alves Filho (Maceió - AL)



Post pli ol du jaroj da neaktiveco, la brazila sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI en Brazilo) denove aperas en la plej grava evento de nia lando, nome Brazila Kongreso de Esperanto (BKE).

Kadre de la 53-a BKE, okazinta en Kuritibo, de la 31-a/majo ĝis la 03-a/junio/2018, ILEI en Brazilo havis la okazon sin prezenti al dudeko da instruistoj, instru-antoj/-intoj kaj estontaj kursgvidantoj. Dum du horoj, unuhora prelego kaj unuhora kunsido en la ĉambro Sylla Chaves ĉe la Universitato UNINTER, ni iom babilis pri la Ligo, ĝiaj celoj kaj agadoj, la historio de la sekcio brazila kaj niaj planoj kaj perspektivoj por la nuna mandato.

Krom tio ni parolis iom pri la rekta metodo Cseh, ĝiaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj, pri la leĝprojekto por endonduki Esperanton en la brazilajn lernejojn kaj pri aplikaĵoj, kiel Duolingo, kiu furoras nuntempe. Kion fari por ke la pli ol 1,7 milionoj da kursfinintoj envenu en Esperantion? Tiu demando, kompreneble, restis sen respondo. Ĝi estas defio por ni ĉiuj, ne nur instruistoj sed aliaj movadanoj.

Inter la partoprenintoj ni kalkulis pri la ĉeesto de Paulo Nascentes, unu el la 4 komitatanoj pri Instruado de BEL kaj iama profesoro de Esperanto ĉe UNB (Universitato de Brazjlio) kaj unu el la antaŭaj sekciestroj, samideano Marcos Zlóv, kiu donis kelkajn klarigojn pri la sekcio de la Ligo kiu, laŭ liaj informoj, jam registris en la jaro 2004, pli ol 700 esperantistojn, kiuj tiam instruis aŭ iam antaŭe lernigis la lingvon en nia lando.

Aliaj celoj de nia agado dum BKE estis esplori la nombron da brazilaj ILEI-membroj, allogi novajn anojn, abonigi al ili la gazeton IPR (Internacia Pedagogia Revuo) kaj elekti komitatanon. Brazilo havas nur du komitatanojn: unu estas Ivan Colling pro lia posteno kiel estrarano de ILEI kaj mi, la nuna brazila sekciestro. Ni rajtas unu plian tian homon por voĉdoni dum la 51-a ILEI-kongreso, okazonta en Madrido la venontan julion.

La brazila sekcio havas nun vatsapan grupon por faciligi la kontaktojn kun nia instruistaro, Fejsbukan paĝon kaj retejon. Ni preparas ankaŭ dulingvan blogon, kiu celas la neesperantistan publikon kaj faldfolion por disdoni dum movadaj kaj nemovadaj edukaj kaj kulturaj eventoj nialande.

Nia movado

Niaj Legantoj

ESPERANTA SUMOO

De la 1-a ghis la 8-a de junio 2018 okazis nova eldono de la Esperanta Sumoo. Jen iniciato, kiu meritas nian atenton.

Ĝi estas entrepreno, kiu celas stimuli la Esperantistaron al pli ofta kaj regula legado. En tiu interesa programo, homoj en la tuta mondo aliĝas memvole al konkuro kun si mem: ili promesas legi ĉiutage po certa kvanto da paĝoj el libro, kiun ili mem elektas, laŭ sia gusto.

Temas do pri lukto por disciplina legado — jen la kialo de la nomo "Sumoo". Luktistoj devas venki sin mem. En la fino de tiu difinita período, ĉiu devas informi la organizanton pri sia sukceso aŭ malsukceso en sia legado.

La Esperanta Sumoo(1) estas iniciato de la konata japana Esperantisto Hori Jasuo, kiu prizorgas la tutan feron 6-foje jare. Normale, la Esperanta Sumoo funkcias dum 15 tagoj, sed en junio, pro multaj eventoj en Esperantujo, ĝi estas pli mallonga.

Brazilanoj lastatempe okupas la duan pozicion inter la plej multenombraj partoprenantoj en la Sumoo. Jen nia invito: ni aliĝu amase kaj atingu la unuan pozicion!

Ek al legado!

(1) http://esperanto-sumoo.pl

KURAĜIGO

De S-ro Hori Jasuo, konata iniciatinto de la sukcesa program "Esperanto-Sumoo", ni ricevis la jenan simpatian korespondaĵon.

Ni kore dankas!

Mi finlegis la Jarkolekton de La Lampiro 2017.

1. Tiu ĉi libro estis donacita de s-ino Shigueco Takahasi, japandevena brazilanino. Mi jam legis la Jarkolekton 2016.

2. La libro estas tre interesa kun diverskampaj artikoloj. Mi malmulte konas Brazilon kaj la brazilan movadon, do mi lernas multe el la jarkolekto.

3. Mi estas ĝoja trovi 2 artikolojn, kiuj menciis la sumoo-on kaj mian nomon.

4. Mi legis kun intereso la intervuon al s-ro Benedikto Silva, jam relative longa konato en Brazilo.

Mi dankas vin pro la laboro de redaktado. Mi atendas la Jarkolekton 2018 kiel legaĵon en la sumoo.

HORI Jasuo (s-ro)
371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3
<hori-zonto@water.sannet.ne.jp>



MALFERMITA VOLONTULA POSTENO ĈE EASP:
PORINSTRUA ASISTANTO

La ideala kandidato...
- scipovas paroli EOn (niveloj A2-B1);
- estas preta dediĉi ĝis plimalpli 04 horojn semajne (ĉeestajn aŭ retajn);
- estas organizita, persistema kaj obstina;

Kaj ni oferas al volontuloj...
- atestilon pri partopreno;
- senpagan kurson pri EO;
- treege agrablan laboretoson;
- senpagan trejnadon pri kiel gvidi paroligajn lecionojn pri fremdaj lingvoj

Ĉu vi pretas kunlabori? Jeskaze, sendu mesaĝon al wilian.gomes@easp.org.br kaj kandidatiĝu!

easp
Esperanto-Asocio de San-Paŭlo